

BRAZILA ESPERANTISTO

66-a Jaro

OKTOBRO-DECEMBRO 1972


N.º 703-705

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, Societo de publika utileco (dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921). Jarabono eksterlande: 15 respondkuponoj.

Sidejo: **Praça da República, 54, 2.º** — Telefono: 232-6309 — RIO DE JANEIRO — BRAZILLO

Respondeca redaktoro (redactor principal): **D-ro Carlos Domingues**

CONGONHAS DO CAMPO - MG



La 12 profetoj skulptitaj en la 18-a jarcento de Aleijadinho (La Kripuleto), kies misformitaj manoj ne malhelpis, ke li farigis la plej granda brazila skulptisto en la periodo.

KONVERSACIO (X)

ŜAKLUDO

— Sed vi almenaŭ scias, ke oni ludas sur ŝaktabulo prezentanta 64 fakojn alterne nigrajn kaj blankajn...

— Ho, jes! Ankaŭ, ke la nomoj de la pecoj estas: reĝo, damo, kurieroj, ĉevaloj, turoj kaj peonoj.

— Kaj ĉu vi scias movi la figurojn?

— Jes. Ankaŭ tion. Sed kio estas — ŝakono!

— Avertu, ke la reĝo estas en fako trafata de kontraŭla peco. La ludanto devas forigi ĝin el la ŝako, formovante aŭ kovrante ĝin per alia peco. Se li ne povas fari unu nek la alian, la reĝo estas en ŝakmato, kaj la partio estas perdita.

— La peono estas tute senvalora figuro; ĉu ne?

— Depende. En malfermludo, eble jes; sed en mez- kaj finludo ĝi fariĝas tre valora. Atinginte la okan fakon, ĝi povas damigi ĉu en damon ĉu en iun ajn alian figuron!

— Kio estas malfermludo?

— En la komenco la figuroj de Blanko kaj Nigro staras kompakte sur du vicoj. Estas necese deploji ilin, por okupi aktivajn poziciojn. Oni elpensis plurajn sistemojn por tio laŭ la nomoj Ruy Lopez, Dampeono, Karo Khan, ktp. Poste mezludo estas lukto por la supereco kaj finludo la penado likvidi la ludon. Ordinare, laŭ la etiketo, la kondukanto de Blanko aŭ Nigro rezignas, renversante sian reĝon, tuj kiam la mato estas neevitebla.

— Ĉu unu flanko ĉiam venkas?

— Ne. La partio povas finiĝi per egaleco, se neniu havas forton por mavigi aŭ se okazas eterna ŝakigo.

— Kio estas aroko?

— Samtempa movo de reĝo kaj turo. Oni povas aroki damflanken aŭ reĝflanken.

— La nuna mondĉampiono estas Fischer; ĉu ne?

— Jes. Li defiis Spassky al matĉo kaj brile venkis, tiel atingante la ĉampionecon pri ŝakludo.

G. P.

PAŜOJ AL PLENA POSEDO, W. Auld, lekturas escolhidas e exercicios de alto nível Cr\$ 25,00

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acôrdo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brasileira Esperantista" 25,00

Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista 60,00

Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto" 80,00

Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante ... 120,00

Patrão: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota deste.

Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota deste.

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

SÃO PAULO

CAÇAPAVA — Koncerne la esperantistaro aktivecon, nia samideano Majoro Gilberto A. Silva Velho prezentis en Septembro lasta al la Stata Deputito Jayro Maltoni detalan raporton pri la laboroj en la jaroj 1970-71-72. S-ro Maltoni deklaris, ke li intencas prezenti novan deziresprimon al la Prezidento de la Respubliko pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

RIO DE JANEIRO

VOLTA REDONDA — Por festi la datrevenon de la apero de la unua libro en Esperanto, la esperantistoj de Volta Redonda — urbo fama pro la grandskala produktado de ŝtalo — entreprenis serion da kunvenoj, prelegoj, kaj komencis kurson por 40 gelnantoj. Inter la prelegantoj ni povas citi: inĝeniero Alberto Flores, sro. João Andrade kaj Sêrvulo Rodrigues Fragoso. Gvidas la kurson inĝ. Flores, delegito de UEA en Volta Redonda.

57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

RAPORTO DE LA REPRESENTANTO DE B.E.L.

La 29-an de Julio pasinta okazis la solena malfermo de la 57.^a Universala Kongreso de Esperanto en Portland, Oregon, Usono, tre bela urbo, kiu gastigis 923 geesperantistojn el 40 landoj.

Laŭ tradicio oni donis al diversaj salonoj kie okazis pluraj programeroj la nomojn de Unesko kaj de la plej eminentaj esperantistoj. Estis salonoj sub la nomoj de Baghy, Canuto, Grabowski, Hodler, Yagi kaj Zamenhof, kies biografiojn aperigis la kongresa libro.

La inaŭguron de la 57.^a U.K en la salono Zamenhof faris s-ro Harry W. Holmes, honora prezidanto de UEA, kiu oficiale malfermis la kongreson salutante la oficialajn reprezentantojn kaj kongresanaron per mallonga parolado.

La Alta Protektanto, s-ro Tom McCall, kiu pro politika motivo ne povis ĉeesti la inaŭguron, sendis leteron klarigante la kialon. Same, la urbestro de Portland, s-ro Terry D. Schunk ne partoprenis la inaŭguron pro malsano, kion li klarigis per letero. Ambaŭ bonvenigis la gekongresanaron.

Parolis poste s-ro James W. Deer, prezidanto de la LKK (Loka Kongresa Komitato), kiu salutante la partoprenantojn de la kongreso ilin bonvenigis, dirante, ke li esprimas sian ĝojon kaj tiun de la esperantistaro de Usono, kie post 57 jaroj okazas Universala Kongreso de Esperanto. S-ro Holmes varme dankis lin.

Okazis poste la salutparoladoj de la reprezentantoj de la landaj asocioj aliĝintaj al UEA, kaj mi kiel reprezentanto de Brazila Esperanto-Ligo, diris la sekvantan minutan paroladon:

"Sinjoro Prezidanto kaj estimataj gesamideanoj,

"Kiel reprezentanto de Brazila Esperanto-Ligo mi varme salutas vin, dezirante, ke ĉi tiu kongreso estu la plej fruktodona al ĉiuj jam okazintaj ĝis nun. Omaĝe al nia karmemora D-ro Zamenhof mi ripetis liajn vortojn okaze de la unua Universala Kongreso de Esperanto en ĉi tiu progresema lando, en Washington: *"Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi!"*

"Ĉar en Sudameriko neniam okazis internacia kongreso de Esperanto, kiel brazilano mi revas pri la tago, kiam ni povos denove renkontiĝi, sed en Brazilo, kie ekzistas laŭleĝe permesataj kursoj de nia kara idiomo, por ke sub la luma stelaro de la Suda Krucio, ni ampleksu kaj firmu pli kaj pli la grandiozan taskon disvastigi la internacian lingvon. Vivu Esperanto! Dankon!"

Post la paroladoj de la diversaj reprezentantoj faris la festparoladon s-ro Guenther Becker, Ĝenerala Sekretario de UEA.

Unu el la programeroj pritraktis la Usonan Vesperon, kiun partoprenis entute, pli ol 900 personoj en iu plenplena salonego. S-ro William Harmon agis kiel programestro kaj kun lerteco donis informojn pri ĉio kaj klarigojn al la programeroj, kiuj siavice pritraktis la ricecon de la usona kultura vivo, precipe pri la amo partopreni en diversaj kluboj. Unue estis prezentita spektaklo pri la praloĝantoj de Usono: grupo da indianoj, kiuj kantis kaj dancis en siaj kostumoj.

Em la 31-a de Julio okazis la unua parto de la Konferenco de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) en la sa'ono Yagy, sub prezido de s-ro Guy-Matte, estrarano de la organizo, kiun partoprenis 30 personoj; ĝi pritraktis du temojn: 1) "Ĉu la moderna vivo pl'ucias la menson?" kaj 2) "Rezolucio de francoj, prezentita al la konferenco pere de la estraro de UEA".

Pri la unua s-ro Matte jene starigis la problemon: La moderna vivo pere de siaj komunik-medioj supersŭtas nin per valor-taksoj, kiuj celas konformigi nin al iu ŝablono. En kiu maniero ni povus kontraŭstari tiun aferon?

Post vigla diskuto, kiun sekvis, partoprenante pluraj ĉeestantoj, estis konsentite, ke konformigo ne gravas kiam temas pri aferoj trafiko, domoj, vestaĵoj, k.s. Gravas kiam temas pri valoroj, kiujn la registaroj aŭ aliaj instancoj volas trudi al ni. Nur per plibonigo de edksistemo povos la estontaj civitanoj akiri distingopovan pensmanieron.

Rilate la duan temon, t.e., la rezolucio de la francoj proponitan, estis interkonsentite ne aprobi ĝin pro la

fakto, ke oni ĝin trovis tro idealisma kaj neaplikebla. Anstataŭe, la ĉeestantoj interkonsentis pri jena REZOLUCIO:

La konferenco de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), okazinta la 31-an de Julio 1972 en Portland, Oregon, Usono, kiun partoprenis 30 personoj el 10 landoj,

ATENTIGAS la junajn esperantistojn, ke la Internacia Lingvo ne estas sufiĉe konata ekster iliaj randoj.

REKOMENDAS al ĉiuj junaj esperantistoj ekaktivi en neesperantistaj junularaj organizoj (NEJOJ) kaj agi interne de ili, klopodante aperigi informajn artikolojn, arangii diskutojn kaj eluzi personajn kontaktojn.

PETAS, ke la junaj esperantistoj klopodu starigi E-kursojn sen atendi, ke plenkreskuloj helpu ilin.

, En la unua de Aŭgusto daŭris la renkontiĝoj de TEJO.

Aliloke, en la salono Grabowski okazis la inaŭguro de la Internacia Somera Universitato (ISU) sub prezido de s-ro David K. Jordan kun ĉeesto de pli ol 150 personoj. La rektoro faris la inaŭguran paroladon pritraktante la instruadon de fremdaj lingvoj en Usono, priskribante ĝeneralan kontraŭstaron al la instruado de fremdaj lingvoj en la universitatoj de Usono kaj donis statistikajn informojn pri la malmulta uzado de la lingvoj antaŭ kaj post doktoriĝo. Tiu fenomeno povas deveni de naciismo, de memsufiĉeco de la angla lingva medio, de la lingva unueco en Usono, aŭ de la manko de iu fremda lingvo rivala al la angla en sciencaj studoj. Ĝuste tiu manko de evidenta rivala fremdlingvo povas doni ŝancon al Esperanto enpenetri usonajn universitatojn, kondiĉe ke ĝia pozicio unue plifortiĝu en universitatoj de Eŭropo aŭ alia mondparto.

Inter aliaj diversaj temoj debatitaj estis la konsiderata plej grava, t.e., tiu, kiu pritraktis la turismon, sub la titolo: "Monda Turismo kaj Lingva Diverseco". Jen la teksto de la Rezolucio Proponita al la Komitato fare de la Rezolucia Komisiono kiel Kongresa Rezolucio de la 57.^a U.K.E.:

La 57.^a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenis 923 homoj el 40 landoj sub la ĉefa diskuttemo "Monda Turismo kaj Lingva Diverseco" KONSTATAS, ke kvankam la monda turismo ĉiam pli vastiĝas, la lingvaj baroj malhelpas veran konon de vizi-

tataj landoj kaj ties popoloj, kaj brem-sas eblan plian evoluon;

ATENTIGAS, ke samtempa kaj komputila tradukmetodoj, eĉ se ili povos esti utilaj en internaciaj konferencoj, certe ne helpas en turismo;

PROPONAS la ĝeneralan adopton de ununura lingvo por turismo kaj vojaĝa sekureco; kaj

INVITAS la registarojn kaj internaciajn organizojn kunvoki tutmondan konferencon pri lingvaj problemoj en la turismo.

Estis ankoraŭ aliaj temoj pritraktitaj, inter ili tiu de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiun partoprenis 17 personoj. D-ro Dazzini raportinte pri la stato de la landaj sekcioj, apelaciis al la instruistaj kolegoj daŭrigi nepre kaj kiel eble plej vaste la instruadon de la lingvo.

Li emfazis ankaŭ la gravecon de aperado de la Internacia Pedagogia Revuo. Partoprenis la diskuton 9 gekolegoj el 5 landoj. S-ino Holand raportis pri la instruado en Usono. Dum 1971 estis instruita la lingvo en 60 lernejoj al pli ol 1000 gelnantoj kaj en la unua fojo en la historio de Usona Universitato estis petita ŝtata kredito por Esperanto-kurso, nome San Francisco Ŝtata Kolegio. D-ro Dazzini anoncis la estontan ILEI-an Konferencon, kiu okazos en Julio 1973, en Maribor, Jugoslavio.

Li citis finfine la jenan rezolucion, kiu estis akceptita en la ILEI-a konferenco okazinta en Budapeŝto lastan monaton: "La konferenco de ILEI, unuiĝo de pli ol 20 landaj sekcioj de instruistoj pri Esperanto, fondita en la jaro 1949-a kaj agnoskita de UNESKO en la 13-a de Oktobro 1952, okazinta la 4-an de Aŭgusto 1972 en la kadro de la 57-a U.K.E., Portland, Oregon, Usono, konsiderante la valoron de Esperanto kiel plej moderna scienco por eduki rilate al la studado de fremdaj modernaj lingvoj kaj por la scio de la kulturoj de la diversaj popoloj; ne preterlasante la gravan rolon, kiun Esperanto disvolvas por la defendo de ĉiuj naciaj lingvoj kaj kulturoj, daŭre minacataj de iliaj esencaj valoroj; substrekante la utilon de Esperanto pro ĝia maksimuma ekzakteco, en la ĝeneralaj lingvistikaj studoj kaj aparte en la moderna lingvistika koncepto strebanta en la saman direkton:

REKOMENDAS al ĉiuj ŝtataj kul-

turaj kaj edukaj instancoj pristudi la eblecojn disponigitajn de la Internacia Lingvo Esperanto kaj akceli gian instruadon kiel eble plej vaste, permesante eksperimentan instruadon laŭ la nun funkciaj modeloj en diversaj ŝtatoj.

Interesa debato okazis poste, pri-traktante pri la "Valoro de Fremdlingva Instruado en la Lernejoj", kiu estis enkondukita de S-ro Guenther Becker, kiu prezentis la rezulton de enketo farita en la Federacia Respubliko Germanujo pri la procento de plenkreskuloj, kiuj regas fremdan lingvon. Fari-ta sur alta scienca nivelo, la esploro montris nur 2% kiuj sukcesis tion fari. Li citis interalie la vortojn de Rektoro Pipho konata fakulo pri la didaktiko kaj metodiko de la angla instruado, ple-dante pri la mizeraj rezultoj de ins-truado pro tro komplikaj semantikaj profiloj, kion eĉ per pli frua komenc-igo de la instruado oni ne povas solvi. Li klarigas unuflanke la sisteman pro-gramigon de la pensado, kiu kredigas al la simpatiuloj por la angla, ke ĝia poz-icio kiel mondlingvo estas perfekta, ali-flanke li proponas Esperanton kiel lin-gvon por la baza lernejo.

Sekvis parolantoj el Usono, Sved-ujo, Bulgarujo, Belgujo kaj Britujo. La ĝenerala opinio esprimita estis, ke la plej promesplena propono rilate al la instruado de Esperanto en la lernejoj es-tas, ke ĝi estu baza lingvo devige ler-nata de la fruaj jaroj en la lernejo.

La plej trafa punkto, kiu montriĝis estis, ke la studentoj mem protestas kontraŭ la lernado de fremdaj lingvoj ĉar ili observas, ke post jaroj da klopodado iliaj antaŭuloj tute ne sukcesis atingi la eblecon praktike uzadi frem-dan lingvon. Fakte en Usono la situa-cio fariĝas kriza tiel, ke post nelonge konsiderinda nombro da lingvaj ins-truistoj estos senlaboraj.

Montriĝis tuta interkonsento inter fakuloj, ke la nuna situacio en diver-saj landoj estas kaosa kaj ke daŭrigo de la instruado de fremdaj lingvoj plejparte estas pro la konkurenco inter la programoj de la politikaj partioj, kiuj kredas, ke se ili ne inkluzivas la instruon de multaj fremdaj lingvoj ili perdos sian prestiĝon. Tiu kredo estas instigata plejparte pro la nereala tak-so de la efiko de lingva instruado kaj parte pro la lingvaj instruistoj. Fakte la plej granda proporcio de la lernan-toj en lernejoj ne kapablas regi sian

SUPERA EKZAMENO

S-ro Jayme Andrade, kiu estis apro-bita kun la noto 10 en la Supera Ekza-meno per Korespondado skribis:

Recife, la 15-an de Julio 1972
S-ro D-ro Carlos Domingues
Brazila Esperanto-Ligo

Estimata Samideano,

Plezure mi ricevis vian afablan le-teron de la 30-a de Junio, kaj mi kore dankas vin pro viaj bonkoraj paroloj pri mia sukceso en la Supera Ekzameno de Esperanto per korespondado

.....
Mi ankaŭ petas, kara D-ro Domin-gues, ke vi ĝentile transdonu al mia tre estimata instruanto, D-ro Joel Vasques Manso, la esprimon de mia profunda dankemo, pro la prizorgemo kompleze-mo kaj pacienco, kiujn li ĉiam elpruvis al mi dum ambaŭ la Elementa kaj Su-pera Kursoj; favore transdonu ankaŭ mian esperon, ke li daŭru helpante min tra la Majstra Kurso!

Ricevu, Sinjoro Prezidanto, miajn deziroesprimojn, ke vi bonfartu, kune kun viaj gefamilianoj, kaj ankaŭ la tuta Estraro, kaj la oficistoj de B.E.L.

Samideane via

Jayme Andrade

propran lingvon. Do se la vidpunkto de la lerno de fremda lingvo devus doni la eblon de komunikado kaj scio de la fremda lando la instruado tute ne sukce-sas. La sola grupo de personoj, kiuj de-vas regi la anglan, germanan kaj rusan lingvojn almenaŭ tiel ke ili povu legi ilin estas la diversaj sciencaj fakuloj.

El la debato montriĝis, ke la uzo de Esperanto kiel baza lingvo por ler-nantoj ne nur estas avantaĝo el la vid-punkto de internacia komunikado ĝe-nerala sed provizas valoran helpon en la lernado de aliaj fremdaj lingvoj. Fin-fine oni pritraktis la venontan U.K.E. en Beogrado. Al Jugoslavio!

Francisco de Souza Almada

57.º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

RESUMO NARRATIVO

Portland (Oregon), U.S.A.
De 29 de julho a 5 de agosto de 1972.

Este é o segundo Congresso Universal de Esperanto, do qual eu participei.

Pelo que observei, a organização é padronizada. Fica sob o controle direto da K.K.K. (Konstanta Kongresa Komitato) e é organizado pela L.K.K. (Loka Kongresa Komitato).

O Congresso realizou-se no Hilton Hotel, em Portland, cujo edifício é apropriado para realizações de congressos, possuindo amplos salões e demais instalações adaptáveis para grandes reuniões.

Autoridades político-administrativas se fizeram representar. O Dr. Ivo Lapna, Presidente da U.E.A. não compareceu (alegações de doença e longa viagem), sendo representado por um dos Vice-Presidentes Julgo tratar-se do sr. Erik Carlén.

De um modo geral, estava bem organizado e movimentado. Em Helsink era mais do dobro de participantes. Porém, informaram-me que os Congressos realizados na Europa, são mais concorridos (maior número de esperantistas e facilidade de locomoção).

As salas de reuniões tinham os nomes de "Zamenhof", "Baghy", "Canuto", "Yagi", "Grabowski", "Hodler" e "Unesko".

Nessas salas, houve a abertura e encerramento do Congresso, banquete, baile, reuniões e preleções a respeito de: "Cu la moderna vivo polucias la menson?", "Kompara literaturo — cu ebla studoobjekto? (William Auld)", "Universala Medicina Esperanto-Asocio", "La kristano en revolucia tempo", "Interkomunikaj problemoj en amatora radio", "Konferenco de T.E.J.O.", "Veterana Esperantista Klubo", "Akademio de Esperanto (nepublika kunveno)", "Internacia Esperantista Klubo Aŭtomobilista", etc..

Na abertura do Congresso, falou representando o Brasil, o Delegado na cidade de Santos, o sr. F. Souza Almeida.

Havia 892 participantes registrados de 38 países.

A programação de passeios turísticos foi satisfatória.

NEKROLOGO

ANTENOR VERAS NASCENTES

La eminenta filologo, katedra profesoro de Kolegio Petro II, Antenor Veras Nascentes mortis en Rio de Janeiro la 6-an de Septembro lasta. Li estis granda amiko de Esperanto kaj vicprezidanto de la 19-a Brazila Kongreso de Esperanto en Rio de Janeiro. Li partoprenis kiel honora gasto en kutima tagmanĝo de esperantistoj. Al sia amiko Prof. J.B. Melo e Sousa li deklaris, ke Universala Esperanto-Metodo de D-ro Benson multe servis al li en la farado de sia Etimologia Portugala Vortaro.

MARIA DO AMARAL MALHEIRO

Nia sindona samideanino F-ino Maria do Amaral Malheiro forpasis en la 22-a de la lasta Septembro. Dum multaj jaroj ŝi diligente laboris por Esperanto en nia oficejo, kie ŝi aktive oficis kiel plenumsekretariino de B.E.L. Ĉe Brazila Klubo Esperanto ŝi estis ĝenerala sekretario, kiu vere agis por doni al la klubo elstaran pozicion en la Movado. Ŝi gvidis kursojn kun notinda brilo ĉe Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko kaj entuziasme kunlaboris en Antologio de Brazilaj Rakontoj.

F-ino Malheiro estis nepino de nia eminenta samideano, juĝisto kaj politikisto D-ro Ubaldino do Amaral. Ni sincere kondolencas la familion, speciale niajn samideaninojn Débora kaj Rosa, ŝiajn fratinojn kaj nian samideanon Manoel Aveleza de Sousa ŝian bofraton.

O "Oficiala Postkongreso" foi na cidade de San Francisco, ficando o pessoal hospedado no "Stata Kolegio de San Francisco". Boa acomodação. Fizemos a viagem por ônibus, pernitando em pequena localidade próxima às florestas da California. No dia seguinte, visitamos parte da floresta onde há as famosas árvores "sequoia gigantea", na "Redwood Empire".

Os passeios em São Francisco foram muitos e variados.

São Paulo, 15-9-72

Denizard Silveira

Aperfeiçoe o seu Conhecimento

Komparu vian tradukon kun la nia, kaj eltiru instruon per esploro de la diferencoj.

ELDOMIGITA PAPAGO

Alberto Deodato

Antaŭ iom da tempo mi rakontis pri germano kiu vivis en Brazilo pli ol tridek jarojn. Li obstiniĝis reiri al patrujo. Post ne tuta monato jam revenis. Kaj al siaj amikoj:

— Mi ne plu kutimiĝas loĝi en lando, kie oni ne aŭdas spritaĵojn pri papago...

Sendube la spritaĵoj estas vere multnombraj inter ni. Neniu sperta aĉetas papagon, ne sciante de kiu domo ĝi venas. En bazaro oni nur aĉetas papagon, se ĝi ankoraŭ ne lernis paroli. Aĉetante tie paroleman papagon oni elmetiĝas al risko. Ĝi ripetas ĉion, aŭditan ĉe la mastro. Mia karmemora Jorge Davis ricevis, kiel donacon, unu el tiuj belegaj birdoj. Sufiĉis, ke sinjorino eniris lian domon, kaj ĝi ekkriis:

— Iru tuj, ke via viro jam alvenas...

Se estis junulo, le birdo babilis:

— Manĝo hodiaŭ ne venos...

Ĝi ripetis la tutan sakraĵon de kie ĝi venis. Kaj pli malbone: la ĉiutagan kvereladon de la diboĉa domo. Malgraŭ ĉiuj tiaj spritaĵoj, io originala okazis en B Hte. Juĝisto la pasintan semajnon dekretis per verdikto la eldomigon de papago. Ĝi apartenis al eksterlandaj gesinjoroj. Kiel drolota birdo, ĝi vivis en ilia apartamento. La malamikoj de la papago plendis, ke ĝi diras maldecaĵojn. Gazetraportistoj esploris la aferon. Nenio tia. La plendon faris najbaroj partianoj de Cruzeiro. La papago estis fanatika al Atlético. Ĉiuhore ĝi blekis:

— Golo de Dario!... Antaŭen, Lola...

TEIXEIRA DE FREITAS PACIFISTA E INTERNACIONALISTA

Mário Ritter Nunes

Da Academia Campista de Letras

Entre as peculiaridades marcantes da índole de TEIXEIRA DE FREITAS sem dvida é merecedora de admiração a do PACIFISTA ou a do INTERNACIONALISTA.

A universalidade do Bem não só lhe era fundamento, mas um supremo ideal da Vida, como afirmara ele próprio. Meditou e escreveu muito a respeito da Paz no mundo, por ela trabalhou incansavelmente, até sua morte, pois dela se lembrou e por ela pediu nos últimos momentos da agonia.

Anteviu — quem sabe se profeticamente para longínquo vir-a-ser dos séculos?! — a “Era da Mundialidade”. Ao decantá-la para seus contemporâneos, fez-se poesia a sua visão apostolar: “Três brevíssimas palavras latinas resumem, em consonância e expressão cristalinas, tudo quanto de mais alto, mais belo e mais nobre pode o espírito humano realizar na sua incerta peregrinação terrena. Pax! Vox! Lux! Ou, ainda mais suavemente, em nosso neolatino idioma — Paz! Voz! Luz!... Três palavras, três letras em cada uma. E uma suavidade verbal maravilhosa a evocar as três supremas realidades da Vida. Realidades que são o fundamento do Orbe. Como progresso e ordem, inteligência e lógica, energia criadora e expressão da existência apreensível. Realidades que também se fazem as belezas supremas do Mundo”.

Em um de seus trabalhos mais bellos, pelo alcance e transcendência da aspiração e pela harmonia da forma — *O Idealismo e o Esperanto* —, ele define e afirma o seu Idealismo. Embora um pouco longo o conjunto de citações, vale a pena recordar e fixar na boa vontade dos presentes essa página de nobre sentimento: “A Humanidade não vive para se dividir e se separar. Ela não pode “dispersar-se”, nem destruir-se, por mais que o queiram alguns dentre nós, a nos inspirar fraterna piedade. Há entre os homens uma “força de gravidade” social, que não é a falsa libertação de uma solidude abso-

luta, nem pode ser também a constrição serpentina, imobilizante e mortal, das formas de “comunhão” petrificadas. Essa força gravitacional é a condição dos movimentos livres, no seio da coletividade que nos serve e nos guia ao mesmo tempo”.

Mais adiante é mais explícito em determinar os nobres objetivos do ideal da Humanidade. Di-lo: “O ideal da Humanidade é engrandecer-se e exaltar-se na multiplicação de fisinomias particulares, na inumerabilidade das formas que se refletem mutuamente de mil modos e sob mil facetas e assim querem configurar a realidade composta e — por isso mesmo relativamente perfeita do Mundo, que é ao mesmo tempo “una” sem deixar de ser “múltipla”, ou melhor infinitamente numerosa.”

.....

Eis, pelas idéias expressas, o retrato de corpo inteiro do pacifista, sobretudo do internacionalista. A fim de concretizar tão cristã e formosa aspiração, trabalhou durante a vida, buscando na Língua Auxiliar Internacional — o Esperanto — o instrumento prático que pode vir a realizar o Pentecostes do recíproco entendimento dos homens de todos os quadrantes da terra. Com tal convicção, já na década 1920-30, como Diretor do Serviço de Estatística Geral de Minas Gerais, adotou o Esperanto como língua oficial daquele Órgão para o exterior, fazendo com que o seu servidor-auxiliar GUIMARÃES ROSA, então estudante de Medicina e depois aplaudido escritor, aprendesse o idioma de ZAMENHOF e por ele projetasse no mundo o pensamento e os trabalhos do Serviço. Criado o IBGE, elevou oficialmente o Esperanto às culminâncias da Língua Auxiliar da Estatística brasileira, cabendo-me a honra de exercer e continuar aqui a missão de GUIMARÃES ROSA em Minas Gerais.

Devotado apóstolo do Esperanto, na última visita que lhe fiz em seu leito de agonia no Hospital dos Servidores do Estado, quase na véspera da morte, ouvi mais de sua alma que de seus lábios a frase esmaecidamente sussurada junto, bem junto, a meus ouvidos — “Cuide do nosso Esperanto”. O ideal de confraternizadora comunicação entre

BRAZILA KRONIKO

ALAGOAS

MACEIÓ — En Associação Alagoana de Esperanto ĉe Edifício Breda funkcias E.-Kurso por lernantoj kiuj celas fari la Elementan Ekzamenon. Estas gvidanto Kolonelo Alves Mata, nia sindona samideano.

MINAS GERAIS

SÃO SEBASTIÃO DO PARAISO — S-ro Luís Anacleto Silos kreis E.-Kurson, kiun nun pro lia foresto gvidas S-ro Marcílio Colombaroli. Laŭ intenco de la fondinto la kurso fariĝos Spiritisma Esperanta Grupo kaj poste la neŭtrala Paradiza E.-Societo.

GUANABARA

RIO DE JANEIRO — La 2-an de Septembro lasta, en la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo, ricevis Elementan Diplomon de Esperanto plia grupo da lernantoj de Prof. Paulo Ludka, kiu de multaj jaroj instruas en Brazila Spiritisma Federacio. La diplomitoj estas Alécia da Silva Gaudin, João Casseta kaj João Fogaça. Al ĉiuj koran gratulon.

— F-ino Tamiko Kapakami, jaŭnino loĝanta en Oslo, Norvegujo, alvenis al Rio de Janeiro la 16-an de Junio lasta kaj vizitis nian sidejon en la sekanta tago. Grupo de esp-istoj promenis kun ŝi por montri la urbon.

— Nia samideano Vittorio Caldinelli, el Hamilton, Kanado, estis en nia sidejo la 29-an de Julio lasta. S-ro Claudio dos Santos per aŭtomobilo kondukis lin tra la urbo.

daŭrigo: p. 2-a

os homens fazia-lhe companhia, alentava-lhe o espírito e o coração nos últimos momentos de vida terrena.

Da conferência “O Bem, a Verdade e a Beleza, Realidades na Vida de Mário Augusto Teixeira de Freitas” feita no dia 15 de Julho de 1972 na solenidade de instalação da nova sede do Conselho Regional de Estatística da 2.ª Região, Rio de Janeiro.

AERODINÂMICO — 1. *Aerodinamika* forto. 2. Kun *flulinia* karoserio.

AERÓDROMO — *Aerodromo*, *aviadilejo*.

AEROLITO — *Aerolito* (Met.): *aerŝtono*.

AEROLOGIA — *Aerologio* (scienco)

AERÔMETRO — *Aerometro* (Fiz.).

AEROMOÇO — *Aviadila ŝtevardo*; *aerŝtevardo*; *aergastigisto*.

AERONAUTA — *Aeronaŭto*, *aerveturanto*; *aerveturisto*.

AERONAŬTICA — 1. *Aeronaŭtiko* (scienco). 2. Ministerio de *Aerveturado*, *Aviadaĉo*.

AEROPLANO — *Aeroplano*.

AEROPORTO — *Aerhaveno*, *flughaveno*, *flugstacio*; *ekflugi de aerhaveno*; *alteriĝi sur Aerhaveno Galeão*.

AEROSTATO — *Aerostato*.

AFABILIDADE — *Trakti kun afableco*.

AFAGAR — 1. *Karesi* al si la barbon; *glatumi* la hundon. 2. *Karesi* tre vanajn esperojn.

AFAMADO — 1. *Fama* produkto. 2. *Fama* pro siaj verkoj; *famekonata* sciencisto; *famiĝinta* pro la heroaĵo. 3. Tute malbonfama fripono.

AFAMAR — La monumentoj famigis la urbon; li famigis pro la heroaĵo

AFASIA — *Afazio* (Med.)

AFASTADO — 1. En loko malproksima; loĝi malproksime de la urbocentro; en fora angulo de la mondo. 2. Ĝi estas du km. for de la centro; ĝi estas fore je dek minutoj. 3. *Apartiginta* de siaj parencoj; *apartigita* de la posteno. 4. *Deflankiĝinta* de la gusta vojo.

AFASTAMENTO — 1. Troa malproksimeco de la centro. 2. Pro *apartigito* de siaj parencoj; *apartigito* de siaj infanoj. 3. Prizorgi forigon de la krimuloj. 4. *Deflankigo* de la rutino.

AFASTAR — 1. *Malproksimigi* la pulvon de la fajro; *malproksimigi* de la danĝero, tento. 2. *Apartigi* infanojn de la plenkreskuloj; li *apartigis* de siaj parencoj; tio *fortenas* de ni la amikojn; *forigu* lin por ne malhelpi. 3. *Forklini* la branĉon por pasi; li *forpaŝis* de la fenestro. 4. *Formeti* antaŭjuĝojn; *forpe*li malbonajn pensojn; *demeti* de si tutan respondecon; por *forigi* la maltrankvilon, *forpuŝi* la tenton. 5. Per sia fiero si *mallogas* ĉiujn; ne *flankiĝi* de la vero; tio *flankenŝovis* lin de politiko; li *erarforiĝis* de la vojo de prudento.

7. *Fortiri* la vualon de antaŭ la bildo, memorplato. 8. Tio *fortenas* multajn de nia movado; miaj amikoj *forturniĝis*, *forturnis* sin de mi. 9. Li *deflankiĝis* de la gusta vojo; ne *deflankiĝu* de la temo, devo.

AFÁVEL — *Afable*, *plaĉema* persono; kun *afable* rideto; per *afablaj* vortoj; *afable* akcepto ĉe familio; trovi bonvolan gastamon.

AFAZERES — Pro miaj okupoj, aferoj; mi havas multajn farotaĵojn.

AFECÇÃO — 1. *Afekcioj* de la haŭto; ia sensa *afekcio*. 2. Bone regi siajn *afekciojn* (animekvilibro).

AFEIÇÃO — Forta *korinklino* al iu.

AFÉLIO — La suno ĉe la *afelio* (Astr.).

AFÉRESE — *Aferezo* (Gra.).

AFERROAR — 1. Abeloj pikas. 2. *Pikinciti* la tirbovojn.

AFERROLHAR — *Rigli* la pordon.

AFERVENTAMENTO — La saŭco postulas nur ekbolon.

AFERVENTAR — *Ekboli* la saŭcon; *boleti* (apenaŭ boli) ĝin.

AFETAÇÃO — 1. Eviti *afekcion* al sia koro. 2. Kun bigota *afektado*; tute senafekta konduto.

AFETADO — 1. Kun *afekciita* koro, konscio; *afekciita* de psikozo, ekscitigo. 2. La *afektuloj* ŝajnigas nur por paradi; tiu *gentilaĉa* dando.

AFETAR — 1. La veneno *afekciis* lian koron; objektoj, kiuj *afekcias* la konscion. 2. Li *afektas*, ŝajnigas modestecon; li *afektis*, antaŭ ol akcepti.

AFETIVO — Tute *afekcia* valoro de la objekto; elvoki *afekciajn* sentojn.

AFETUOSO — *Amema* patro; per amika manpremo; la patrino mienis tiel *ameme*, *kormole*.

AFGĀ — 1. La afgana popolo. 2. La afgano (loĝ. Afganujo).

AFIADO — 1. *Tranĉilo* *akrigita* per ŝtono; *akra* tranĉilo; kun *akraranda* klingo. 3. *Fajna* orelo de muzikisto.

AFIADOR — *Akrigilo* de, por razklingo; ŝtona, rimena, rotacia, plata *akrigilo*.

AFIANÇAR — 1. *Kaŭcii* akuzitin; *garantii* ŝuldon. 2. Mi *certigas* vin, ke...

AFÍDIO — *Afido* (Zoo. "aphis").

AFILADO — Kun *pinta* nazo.

AFILHADO — *Mia* baptofilo.

AFIM — Unu mia boparenco: mi boparen*ciĝis* kun li. 2. *Afinaj* mensoj

AFINAÇÃO — *Agordo* de piano, kordoĵ.

AFINADOR — *Agordisto*; *pianagordisto*.
AFINAGEM — *Fari afinacion* (Meta.) de la krudfero.

AFINAL — Li *fine* venis; *finfine* vi komprenis.

AFINAR — 1. *Pintigi* kraĵonon; *akrigi* la pinton de kraĵono. 2. *Akutigi* la voĉon, sonon; la fajfo *akutigi*s. 3. *Agordi* pianon; *agordi* la voĉon al tono. 4. Via temperamento *afinas* al mia; lia animo *agordi*gis pie. 5. *Fajnigi*, *rafini* substantcon per fizikaj procedoj.

AFINIDADE — 1. Pro nia *boparenceco*. 2. *Afineco*, *harmonio* de temperamentoj; lia animo *harmonias* kun la mia. 3. La *kombinige*mo, *afineco* de hidrogeno al oksigeno; fero estas forte *afina* al sulfuro.

AFIRMAÇÃO — 1. Via *aserto* ja pravas. 2. Ricevu la *certigon*, ke...

AFIRMAR — Li *asertis* tion al mi; li *asertas*, ke tio okazis; mi *certigas* vin, ke ne estas vero.

AFIRMATIVA — 1. *Malvera aserto*. 2. Li respondis per *jeso*.

AFIRMATIVO — 1. Doni *jesan* respondon; respondi *jese*. 2. Nea kaj *aserta* propozicio.

AFIVELAR — *Buki* la zonon, rimenon.

AFIXO — *Afikso* (Gra.); prefiksoj, infiksoj kaj sufiksoj estas *afiksoj*.

AFLIÇÃO — *Fari*, *kaŭzi aflikton* al iu; montri sian *afliktecon*; en sia *afliktig*o; partopreni ies *afliktigon*.

AFLIGIR — 1. Via malsano lin *afliktis*; li *afliktigis* pro ĝi. 2. Tia konduto *ĉagrenas* min; li forte *ĉagrenigis*, ĉar li maltrafis la vagonaron.

AFLITO — 1. Kun *afliktita* mieno; ili estas *afliktitaj* de la manko de leteroj. 2. Pro timo li agis *malserene*.

AFLUENCIA — 1. La *alfluo* de riveroj al Amazono. 2. Granda *alfluo* de turistoj.

AFLUENTE — 1. Unu *alfluanto* de Amazono. 2. La turistoj *alfluantaj* al nia fojro.

AFLUIR — 1. Rivero N. *alfluas* al Amazono, en Amazonon. 2. Turistoj *alfluas* amase en la urbon, al la fojro; ili *enflu*is la urbon.

AFOGAR — 1. *Droni* en rivero; *droni* sin en lago; *dronigi* la hundon. 2. *Droni* en lukso. 3. *Stufi* la viandon por konservi la sukon.

AFONIA — *Afonio* (Med.)

AFÔNICO — Mi estas *senvoĉa*.

AFORISMO — *Esprimi* sin per *aforismoj*; la juraj *aforismoj*.

AFORTUNADO — Tre *fortuna* ĉe ludkarto, virinoj.

AFRANCESAR — *Francigi* la modon.

AFREGUEZADO — *Multklienta* butikoj, hoteloj.

AFRICANO — 1. La *afrikaj* popoloj. 2. La *afrikanoj* (log. Afriko).

AFRICATA — *Afrikatoj* (Gra.): c, ĉ kaj g.

AFRODISIA — *Afrodizio* (Fizi.); estigi *afrodizion*.

AFRODISÍACO — *Afrodiziiga* drogo: preni *afrodiziiga*ĵon.

AFRODITA — *Afrodito* (Bot.).

AFRONTA — Ricevi *insulton* de iu.

AFRONTAR — 1. *Insulti* iun. 2. *Alfronti* riskon, dangeron.

AFROUXAR — 1. *Malstreĉi* la ŝnuron, muskolon. 2. *Disbuki* pli vaste la zonon; *malstrikti*gi bluzon. 3. *Mildigi*, *malstrikti*gi, *malseverigi* disciplinon.

AFTA — *Afto* (Med.)

AFTOSE — *Afta* febro, endemio.

AFUNDAR — 1. La ŝipo *dronis*, *alfundigis*, *fundeniris* subakvigis; la ŝipo *sin*kas (malrapide); bombo *dronigis* la koton; li *enigis* ĝis la kolo en la marĉon. 3. *Pliprofundi*gi la puton.

AGÁ — 1. *Agao* (turka komandanto). 2. La litero *ho*.

AGACHAR — 1. Li *kaŭris* kaj evitis la baton.

AGALDAR — *Galoni* la veston.

AGAMI — *Agamio* (Zoo. "psophia").

AGAMO — *Agamia* (sen fekundigo).

AGAPANTO — *Agapanto* (Bot. "agapanthus").

AGAPE — 1. *Festeno*, *bankedo*. 2. *Agapo* (primitiva komunio).

AGAR-AGAR — *Agaragar*o (gelateno).

AGÁRICO — *Agariko* (Bot. "agaricus").

AGARRAR — 1. *Kapti* bovon ĉe, je la kornoj; *kapti* iun ĉirkaŭ talio; *preni* iun je brako; *ĉirkaŭpreni* ies brakon per la mano. 2. *Kroĉi* sin al rando de boato; *kroĉigi* al jupo de la patrino; *alkroĉigi*, *alkroĉi* sin al savtabulo; forte *tenigi* al la ŝnuro.

AGASALHAR — *Varmigi* sin per mantelo; surmeti *varmigan* veston.

AGASALHO — *Varmiga* vesto; tio donas al vi *varmigon*; la servistino prenas la *survestojn* de vizitantoj.

ÁGATA — *Agato* (Min.)

AGAVE — *Agavo* (Bot. "agave").

AGÊNCIA — 1. Teatra *agentejo*; vojaĝ-*agentejo*; patent-*agentejo*; pres-*agentejo*; luiga *agentejo*; serv-*agentejo*, dungoficejo. 2. CED estas nia *agencio* por ĉiu informado.

AGENDA — *Prepari*, legi la *agendon* (noto pri farendaĵoj).

AGENTE — 1. Komerca *agente*; diplomata *agente*. 2. La *aganto* de kancero; la *aganto* de la verbo. 3. *Efikanto* (Kem., Fiz.).

AGIL — *Facilmova*, *rapidmova* atleto.

AGILIDADE — *Facilmoveco*, *rapidmoveco* de atletoj; li *facilmove* surgrimpi la arbon.

AGIO — Ricevi la *agion* (diferenco inter nominala kaj efektiva valoroj).

AGIOTAR — *Agioti* per kambioj kaj rimeso.

AGIR — 1. *Agi* juste; *agi* kun kolero, kruele kun iu, kontraŭ iu; lerte *agadi* sur la politika kampo; laŭ sia *agadmaniero*. 2. Kloro *agas* sur hidrokarbidoj; la forto *agas* sur la pezocentro; la du fortoj *agas* sur disaj direktoj.

AGITAÇÃO — 1. *Svingo* de flugiloj, manoj. 2. *Agitado* de la kuracilo. 3. *Agitado* de la pensoj; pro *agitigo* de la animo; nerva *agitigo*. 4. *Kirlado* de likvaĵo. 5. Anarkia *agitado*; *agitado* de homamasoj; *agitada* frapfrazo; *tumulto* en kunveno. 6. *Rapidego* tra la stratoj. *vigla movado* en la placo.

AGITADOR — 1. *Agitilo* por medikamentoj; *kirlilo* por likvaĵo. 2. Popolagitisto, *agitisto*; la *agitanto*; komunista *malpacigulo*.

AGITAR — 1. *Svingi* la manon; *svingi* pugnnon minace; *svingi* naztukon adiaue. 2. *Agiti* kuracilon. 3. *Agiti* la pensojn; la animoj *agitigis*; la nervoj *agitigis*. 4. *Kirli* la likvaĵon senĉese. 5. *Agiti* la homamasoj; *malpacigi* la laboristojn.

AGLOMERAR — 1. *Aglomeri* la popolamasoj; homoj *amasigis* antaŭ la domo. 2. *Aglomeri* gruzojn kaj sablon.

AGLUTINANTE — 1. *Aglutina* (Gra.) lingvo. 2. *Aglutinaĵ*, *gluecaĵ* substancoj; *gluilo*.

AGLUTINAR — 1. *Aglutini* vortojn. 2. La sero *aglutinas* sangoglobetojn. 3. La fragmentoj *kungluigis*; unu korpo *algluigis* al la alia.

AGNADO — *Agnato* (familiano el vira linio).

AGNOSIA — *Agnozio* (Med.).

AGNOSTICISMO — *Agnostikismo* (Fil.).

AGNÓSTICO — 1. La *agnostika* doktrino. 2. *Agnostikulo*.

AGONIA — 1. Esti en *agonio* (antaŭ la morto); lia *agonio* finiĝis. 2. La *angoro* antaŭ la danĝero.

AGONIZANTE — *Preĝo* por la *agoniantoj*; la *agonianta* vundito.

AGONIZAR — La vundito jam *agonias*. 2. La somera tago *agoniis*.

AGORA — Vi nun scias; tuj nun mi iros; de nun por ĉiam; ĝis nun.

ÁGORA — *Agoro* (placo).

AGORAFOBIA — *Agorafobio* (Psi.).

AGOSTINIANO — La *aŭgustenanoj* (Fil.).

AGOSTO — En la monato *aŭgusto*; la 2a. de *aŭgusto* 1972.

AGOURAR — *Aŭguri* malbonon al iu.

AGOUREIRO — *Malbonaŭgura* birdo.

AGOURENTO — *Malbonaŭgura* signo.

AGOURO — *Malbona aŭguro* por nia entrepreno; trovi *vesignojn*.

AGRACIAR — *Ordeni* iun per la Honora Legio.

AGRADAR — 1. La domo *plačas* al mi; al mi tre *plačas*, ke...; ne *plačas* al mi ĉi tie. 2. Oni ne povas *kontentigi* katon kune kun la rato.

AGRADÁVEL — 1. Tre *plača* loko; fari *plezurigan*, *agrablan* promenadon; estas *agrabla* al mi, ke...; 2. En *plača* kunesto.

AGRADECER — 1. *Danki* al iu, iun pro ricevita komplezo; *danki* ion al amiko. 2. *Danki* iun per rideto; *danki* al iu per donaco; *dankrespondi* invitleteron.

AGRADECIDO — 1. *Dankon* pro invito. 2. Mi estas tre *danka* al li pro komplezo; mi *danke* ricevas vian helpon. 3. Vere *dankema* junulo.

AGRADECIMENTO — 1. Esprimi sian koran *dankon* al iu pro invito; akcepti, transdoni *dankon*. 2. Meriti ies *dankadon*; akcepti ies *dankon* pro la helpo.

AGRADO — 1. Faru laŭ via *plaĉo*, *bontrovo*; se *plaĉos* al li; akiri *plaĉon* en la okuloj de la reĝo; trovi *plaĉon* ie, en io; trovi, renkonti *plaĉon* ĉe la legantoj.

AGRAFIA — *Agrafio* (Med.).

AGRAFO — *Agrajo* (Kir.).

AGRAVAMENTO — 1. *Pligraviĝo* de malsano; *pliakriĝo* de krizo; *malmildigo* de puno. 2. *Apelacio* al supera instanco.

AGRAVANTE — 1. Kun *pligravigaj* cirkonstancoj.

AGREDIR — 1. *Ataki* iun. 2. Via lando *agresis* (ataki la unua, ne estante mem minacata).

AGRESSÃO — 1. Ricevi *atakon*. 2. Fari *agreson* (atako, ne estante mem minacata).

AGRESSIVIDADE — 1. *Atakemo* de hundo, vento. 2. *Agresemo* de militema popolo, de mensmalsanulo.

AGRESSIVO — 1. *Atakema* hundo. 2. *Agresema* (ema ataki, ne estante mem minacata) popolo; kun *agresa* tono. 3. *Agrese* konduki la kampanjon.

AGRESTE — 1. *Kampara* floro. 2. *Sovaga*, *nekultivita* frukto.

AGRIÃO — *Kreso* (Bot. "hasturtium officinalium").

AGRICULTOR — 1. *Agrokultivisto, terkultivisto*. 2. *Agrikulturisto* (agrokultivisto kaj bredisto).

AGRICULTURA — 1. *Agrokultivado, terkultivado*. 2. *Agrikulturo* (agrokultivado kune kun la bredado de brutoj, ktp).

AGRIDOCE — *Dolĉacida* gusto.

AGRILHOAR — *Kateni, enkatanigi* krimulon.

AGRIMENSOR — *Termezuristo*.

AGRONOMIA — *Agronomio* (scienco); *La Agronomia* Altlernejo.

AGRONÔMICO — *Agronoma* esplorado.

AGRÔNOMO — *Agronomo, agronomisto; agronoma* ingeniero.

AGRÔSTIDE — *Agrostido* (Bot. ('agrostides')).

AGRUPAR — *Grupigi* ĉe la pordo, ĉirkaŭ sia standardo; *arigi* ĉirkaŭ la gvidanto.

ÁGUA — 1. Pura, trinkebla, dolĉa, minerala, filtrita, mara, sala, mola, malmola *akvo*; *fontakvo*. 2. Sankta *akvo*, sanktakvo, benita *akvo*. 3. Glacia *akvo*, glaciakvo. 4. Staranta. senflua, fluanta *akvo*; *fluakvo*. 5. La ŝipo enlasas *akvon*; venigi *akvon* en la buŝon. 6. Reto de *akvoduktoj*, *akvokonduktiloj*; muelilo movata de *akvoforto*. 7. *Oksigenakvo*, oksigena *akvo*; kolonja, roza *akvo*; tualetakvo (aromiga); *regakvo* (HCl + NNO). 8. *Akvosigno* de poŝtmarko, dokumento; diamanto de pura *akvo* (perfekta travidebleco).

ÁGUA-DA-COLÔNIA — *Kolonja akvo* (parfumajo).

AGUADA — Bieno kun abunda *akvo-fluo*; bonaj *akvofontoj*.

AGUADO — Tute *akveca* kaĉo.

ÁGUA-FORTE — 1. *Fortakvo* (Kem.) 2. *Akvaforto* (kupra plato gravurita per fortakvo).

ÁGUA-FURTADA — *Mansardo, subtegmenta ĉambro, subtegmento*.

ÁGUA-MARINHA — *Akvamarino* (juvelŝtono).

ÁGUA-MEL — *Medo, mielakvo* (alkohola trinkaĵo).

AGUAR — 1. *Akvi* (doni akvon) planton; *akvumi* (malsekigi), *priverŝi* ĝardenon. 2. Tio *venigis akvon* en mian buŝon.

AGUARDAR — *Atendi* pli bonan okazon; *atendi* la horon de malfero; *atendi* ĝis li decidis.

AGUARDENTE — 1. *Brando* (el fruktoj, grenoj, vino) el ĉerizo. 2. *Rumo* (el suko de sukerkano).

AGUARRÁS — *Terebintoleo* (Kem.)

AGUÇADO — 1. *Akra dento, ungo; akrepinta* pikilo, tranĉilb. 2. *Akra vido*, rigardo, orelo.

AGUÇAR — 1. *Akrigi, akrepintigi* glavon, pikilon. 2. *Akrigi* la okulojn, orelojn, percepton; *streci* la rigardon, aŭskultadon, atenton. 3. *Spici* ies scivolon, volupton.

AGUDO — 1. *Akra dento, pikilo*. 2. *Akra krizo, malvarmo*. 3. *Akuta* angulo, voĉo, apendicito.

AGUENTAR — 1. *Elteni, rezisti* baton; *elteni, toleri* mizeron, suferon. 2. Rompi *it* vazo longe sin *tenas*.

ÁGUIA — 1. *Aglo* (Zoo. "aquila"); fiŝaglo (pandiono); *maraglo* (haliaeto). 2. Kun *agla* rigardo.

AGUILHOAR — *Pikinciti* bovojn.

AGULHA — 1. *Kudrilo*; serĉi *kudrilon* en fojnamaso. 2. *Stebilo* (por maŝino); *trikilo*. 3. *Nadlo, montrilo* de kompaso; *nadlo* de gramofono; *nadlo, fintubo* de inektilo; *suturnadlo* (Kir.) 4. *Relforko* de fervojo; *trakforko*.

AH! — 1. *Ha!* (ekmiro, surprizo, pli viva sento, ironio, rido). 2. *Aĥ!* (forta surprizo bedaŭro), kion vi faris? 3. *Ha ha* (tre viva sento), nun vi scias; *ha ha!* (ironio), vi estas iu reĝo; *ha ha!* (rido), li rikanis.

AI! — 1. *Aj!* (viva doloro); *huj!* (subita doloro); *aŭ!* 2. *Ve!* (gema plendo pro kordoloro); *ve* al mi! ho *ve!*

Aí — 1. *Tie* (loko); kiu estas *tie?* *jen* (altiri atenton) estas la mono. 2. *Tiam* (tempo); *tiam* mi diris...

AIAPANA — *Ajapano* (Bot. "eupatorium ayapana").

AILANTO — *Ailanto* (Bot. "ailanthus")

AILERON (f.) — *Alerono* de aviadilo.

AINDA — 1. Li *ankoraŭ* ne venis. 2. *Ankoraŭ* pli alta; voli *ankoraŭ* pli; ripeti *ankoraŭ* unu fojon. 3. *Eĉ* pli riĉa, ol vi; *eĉ* pli, se... 4. Mi *plue* restos. 5. *Same* tiel li insistis; *almenaŭ* se mi havus iom da mono...

AIPO — *Celerio* (Bot. "apium graveolens"); *tubercelerio*; *folicelerio*.

AIRADO — *Facilmora* virino; *malĉastulino*.

AIRELA — *Vaccinio* (Bot. "vaccinium myrtillus").

AIVECA — *Deŝutilo* (de plugilo).

AJARDINAR — *Ĝardeni* la terenon.

AJEITAR — 1. *Ĝustigi* sian kravaton. 2. *Ordigi* la aferojn.

AJOELHAR — 1. Li longe *genuis* antaŭ la Dipatrino; *genuigi* antaŭ sanktulo.